

# **Amaskomunikilaj rilatoj por Esperanto. Pri ni kaj nia lingvo en paperaj kaj retaj gazetoj, radio kaj televido**

**(akompana teksto por seminario)**

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

(2010-02-25)

## **Strategioj por Esperanto**

Desuprismo/desubismo, kreskigo/stabiligo kaj finvenkismo/raŭmismo (Ni volas.../ni estas...). (Ni konsciu pri „partopreno“, ĉe homoj kiuj ne interesiĝas pri strategioj ktp.)

Desuprismo: Bezonus informadan streĉon ne fareblan/financeblan de la nuna Esperanto-parolantaro. Necesus tial – se oni ĝin volus – unue grandigi la bazon de parolantoj.

Sekvoj por la enhavo de informado:

- Desuprismo: Ŝparus monon, monda lingvoproblemo, justa lingvo, protektas minoritatajn lingvojn, angla havas malavantaĝojn („lingva imperiismo“ k.s.).

- Desubismo/kreskigo: Hodiaŭa stato de Esperantujo, kresko.

## **Informpiramido**

E-uloj	<i>Necetas:</i>
Progresantoj	Praktiko, konversacio; reviziado lingvoscio
Komencantoj	Pluinstruado
Interesitoj	Varbi por kurso
Ekinformitoj	Pluinformi (stando, interparolado)
Nenion-sciantoj	Informi (amask., ekspozicio, flugfolioj, afiŝo)

Zorge uzi niajn rimedojn (tempo kaj mono): Prefere gazetara artikolo ol flugfolio; prefere flugfolio ol interparolado (depende de la atingita nivelo).

## **Informado aktiva/pasiva**

„Aktiva“: Amaskomunikilaj rilatoj, anoncoj, flugfolioj k. s.

„Pasiva“: Niaj retejoj, leksikono

## **Kial entute gazetarumi – kaj kial ne?**

Esperanto-asocioj estas ĉefe asocioj de Esperanto-parolantoj, kiuj devas zorgi pri la bono de tiuj (renkontiĝoj, gazeto, libroservo k. s.). Kvar niveloj – individuo, grupo, Esperantujo, mondo. Disvastigi Esperanton (kaj por tio gazetarumi) servas ĉefe nur al la mondo, apenaŭ al la tri aliaj niveloj; do ne estas la ĉefa intereso de la membroj.

Pli da varbado kaj pli da interesitoj kaj lernantoj signifas pli da laboro por la estraranoj (kiuj ofte akceptis la oficon nur ĉar neniu alia volis, do strebas fari nur la minimumon). (Deklaroj kaj laborplanoj/praktiko: „Ĉiu estas favora, kondiĉe ke estas la aliaj, kiuj faras la laboron.“)

La dungitoj kutime havas fiksan salajron el membrokotizoj kaj estas superŝutitaj per laboro – ankaŭ tie ne estas motivo aŭ libera tempo por aldona laboro.

Ankaŭ la malgrandaj memstaruloj kaj entreprenistoj en Esperantujo (eldonistoj de libroj, gazetoj kaj muziko; organizantoj de renkontiĝoj) ne havas veran intereson disvastigi Esperanton: Se ili investas tempon kaj monon por krei novajn parolantojn, ili aldonas tiujn al la granda komuna „lago“ de Esperanto-parolantoj – kaj revenos por aĉeti iliajn servojn nur tre malmultaj. Ĉiu ŝatas ĉerpi el la lago, preskaŭ neniu ŝatas alfluigi ion.

Problemo: Preskaŭ neniu hodiaŭ havas veran intereson disvastigi Esperanton kaj tiucele gazetarumi – nur kelkaj unuopaj entuziasmuloj.

Sed: „Publish or perish“ (en la scienco). Kio ne aperas en la amaskomunikiloj, tio ne ekzistas.

### **Eblaj celoj:**

- Disvastigi Esperanton inter individuoj (bazo: konatigi Esperanton; nun: eble nomo konata, sed eraraj ideoj, „jam mortis“ ktp. „Ĉu vi volas lerni la tuvinan? - Kial/kio estas la tuvina?“ „La perspektivoj por Esperanto estas bonaj – ja nur malmultaj scias bone, kio ĝi estas. Ili estus malbonaj, se ĉiu scius kaj tamen neniu interesiĝus.“ Scio kiel bazo por decido – „mi volas lerni kaj planas uzi Esperanton“ aŭ „mi ŝatas Esperanton, sed mi ne vidas uzeblecon en mia vivo; do mi ne lernos, sed eble subtenos“)

- Prepari akcepton/subtenon/subvencion flanke de politikistoj, lernejestroj, ŝtato-ficistoj k. s. Iam eble: Oficiala EU-lingvo; unua lingvo en ĉiuj lernejoj. (Danĝero 1: Ĉar tio ne funkciis ĝis nun – Esperanto = „lingvo de (daŭra) malsukceso“. Danĝero 2: Prezenti politikan projekton provokas la ĵurnaliston serĉi kontraŭparolanton...)

- Altigi (krei) la prestiĝon de Esperanto-parolantoj kaj Esperanto (sen la celo, ke la informitoj lernu). Plibonigi/realismigi la etoson pri Esperanto en la socio.

- Plenumi moralan informdevon al la socio.

Se la celo estas disvastigo: Kiel plu post la publikigoj? Informiloj, kursoj, ensociigo.

Ĉu/kiom longe vi planas gazetarumi? Kiom da tempo investi? Kial, kiuj internaj motivoj, kiuj celoj?

### **Enhavo: Kion komuniki al ĵurnalistoj (kaj kion ne)?**

Indas scii, pri kio oni parolas, inkluzive de realismaj nombroj. Sekve informado estas malpli tasko por novuloj. [www.esperantoland.org/de/presse.html](http://www.esperantoland.org/de/presse.html)

Prezento de **la hodiaŭa realeco de Esperanto**: Renkontiĝoj internaciaj, interreto, muziko, infanoj/denaskuloj, Afriko, Nepalo - kaj ilian progreson dum la pasintaj jardekoj. Junuloj (ĉar grandparte homoj lernas kiel junuloj kaj pli facile sekvas samaĝan modelon). Libroj, gazetoj. (Ĵurnalista ne povas multe moki pri prezento de la realeco.)

Iom lingvostrukturo, ekzemplaj frazoj; komunumo; historio; fono.

**Privata uzado:** Rilato ĉ. 1:100 ĝis 1:4000 kompare kun la angla lingvo. **Kreskado:**

Renkontiĝoj, muziko, familio/denaskuloj, interreto (vikipedio), Afriko, scienco pri Esperanto, vortaroj. Akceptiĝo ĉe PEN Internacia. (Scii, ne nepre diri: Stagno ĉe libroj (malfacila tutmonda merkato, interreto) kaj asocioj (ne plu necesas por Esperanto-uzado))  
[eo.wikipedia.org/wiki/Statistiko\\_de\\_Esperantujo](http://eo.wikipedia.org/wiki/Statistiko_de_Esperantujo)

**Ŝtataj instancoj:** Ĉinaj retejoj, papo, 6000 ekzamenoj jare en Hungario, 50 universitatoj tutmonde, studoj en Poznano, profesoro en Amsterdamo, lingvo en Eŭropa Referenckadro

**Lernfacileco:** Du ĝis tri semajnfinoj (ĉ. 50 horoj) kiel bazo; ĉ. triono de la tempo por sama nivelo en aliaj lingvoj; rapide eklernebla: verŝajne ĉ. 80 % de la Esperanto-parolantoj lernis Esperanton dum maksimume 50 horoj antaŭ la unua ekuzado. Sen instruisto (plu)lernebla. Alta nivelo atingebla (post dek jaroj ofte pli alta ol en aliaj fremdlingvoj; duona horo tage: 10 jaroj Eo ~ 30 jaroj angla).

**Neŭtrala, tutmonda kulturo:** Neŭtraleco hodiaŭ malpli grava argumento (franco parolas kun italo en la angla aŭ Esperanto – ambaŭkaze neŭtrala lingvo). Tamen: Angla-usona kulturo ĉien disvastiĝas; tradukoj el la angla al germana: ĉ. 50 % de la tradukoj; tradukoj el la angla al Esperanto: ĉ. 20 % de la tradukoj en Esperanton; pli ekvilibra.

**Ne:** Bedaŭro pri ne-akcepto de Esperanto, pri stagno/malkresko de membronombroj (aŭ kun klarigo: Signo de normaligo – hodiaŭ asocioj malpli gravas pro interreto ks.; „ĉu vi membras en asocio de anglaparolantoj?“), pri iu ajn malsukceso/malprogreso/neprogreso rilate al Esperanto (se ne eblas montri, ke jen okazis diskriminacio, kiu povas parte klarigi la nunan malgrandecon de Esperantujo). Ĉiukaze plendi danĝeras – povas esti, ke la ĵurnalisto kredas la argumentojn de la alia flanko.

Ne (laŭ mi): Monda lingvo-problemo en ĉiuj facetoj. „Ni volas...“ - „Kaj kion vi jam atingis?“

Dependeco de la urbograndeco/gazetograndeco k. s.: Kion komuniki en grandurbo/en urbeto; al granda/malgranda gazeto; al pagata/anoncgazeto? Legi gazeton por kompreni, kion eblas tie enmeti (rubriko/graveco).

**Nomoj por Esperanto:** Internacia lingvo; eble: pontlingvo; malpli: planlingvo (kp. „planekonomio“); ne (sed ofte ne evitebla): artefarita lingvo; eble lingvo de tutmonda komunikado, de internacia amikeco, por vojaĝoj k. s.

**Nombro de parolantoj:** Tutmonde ĉ. 100.000 parolas Esperanton flue kaj regule (ĉ. 100.000 ĝis 200.000 en Eŭropo dirus „mi parolas Esperanton“, se eliri de la censoj en Litovio kaj Hungario). Verŝajne kelkaj milionoj iam lernis Esperanton. (Vikipedio: Nombro E-parolantoj)

Tri esencaj informoj (ekz. parolantoj en 120 landoj; lernebla dum tri semajnfinoj; 120 libroj jare). Tiujn oni povas memori por transdoni en interparolado/intervjuo eĉ sen la koncernaj demandoj.

Informi laŭ propraj preferoj kaj intereso de la ĵurnalisto. Ni havas multege pli da informoj ol unu artikolo povas prezenti.

Poste kontroli la rezulton (vidu sube) por kompreni, kio publikiĝas kaj kiel.

### **Kio restos ĉe leganto/aŭskultanto post semajno/monato/jaro?**

„Estis io pri Esperanto.“ „Sonis interese.“ „Pozitiva prijuĝo de ĵurnalisto.“ Sekve: Pli gravas la etoso de la interparolado (kiu speguliĝos en la artikolo) ol la unuopa informo. Eĉ pli en radio/televideo.

### **Okazoj por transdoni informojn**

Ĉefe renkontiĝ(et)oj kaj prelegoj, jarĉefkunveno, eble koncerto aŭ vizito de eksterlandano; ekspozicio; kursanonco; maloftege nura teksta informo sen palpebla evento (tamen: „Eo-vikipedio kreskis“).

Krei okazaĵojn: Prelegoj, eble en serio „Esperanto en la praktiko“. Ebleco „regionigi“ novaĵon: „En urbeto X okazos prelego pri 'Esperanto en Afriko!'.“

### **Kiel komuniki al ĵurnalistoj?**

Al kiom da ĵurnalistoj informi/limo al trudvarbado? (Ofte kvin; ĝis kvindek adresoj) Kiel kunmeti adreslistojn? (Urba gazetara oficejo – tiu kelkfoje mem aldone dissendas; interreto) Telefoni, retmesaĝi aŭ telekopii, retelefoni (ĉu bone alvenis? Ofte fakte ne! Ĉu pliaj demandoj? Ĉu iu venos al gazetara interparolado?); malofte paperaj leteroj.

Tempoplano, ekzemple renkontiĝo de 150 homoj: Eventuale komuniko, ke oni decidis okazigi en la urbo, do eble 12 monatojn antaŭe. Televideo bezonas kelkfoje datojn plurajn monatojn antaŭe – sed ofte sufiĉas ses ĝis tri semajnoj. Ebleco transdoni plurajn informojn – se oni antaŭplanas la dividon de la temoj (baza informo; estos koncerto – ni invitas lokulojn; partoprenos infanojn).

## Formoj de tekstoj

Gazetara(j) komuniko(j) antaŭ la evento, dume. Aldonaj tekstoj pri la evento, eble la organiza asocio, unuopaj aspektoj de Esperanto (kresko, interreto, muziko ktp.)

## Strukturo de gazetara komuniko

Kio, kiu, kiam, kie, eble kial, kiel. Ĝis ĉ. 30 linioj. Alineaj titoloj. Plejgravaĵoj en la unuaj tri linioj. Malkreskanta graveco.

## Gazetara interparolado/akcepto de ĵurnalistoj de radio kaj televido

Preparado de gazetara interparolado („gazetara konferenco“): Fiksi daton, eble interkonsente kun unu/du ĵurnalistoj. Trankvila ĉambro, kafo/teo/senalkoholaĵoj. Antaŭvidi duan/trian helpanton aŭ intervjupartneron aŭ gvidanton tra la domo; bonas havi du aĝgrupojn (mezaĝulo kaj junulo), kaj viron kaj virinon, eksterlandanon parolantan la lokan lingvon. Eble iu protokolos por povi poste reipensi la interparoladon. Gazetara komuniko, io pri Esperanto, pri la asocio, pri unuopaj aspektoj (en sufiĉa kvanto aŭ iu kopios dume; nur la skribe transdonitaj informoj estas certe transdonitaj). Eble folio kun niaj nomoj. Listo de ĉeestantaj ĵurnalistoj (nomo, gazeto, telefono, retpoŝta adreso) por ebla posta kontakto. Kiam aperos/elsendiĝos la kontribuo? Kiel ni ricevos kopion?

Fiksi gvidanton de la kunveno (kies signoj eble mallongigos la paroladon de iu alia). Eble prezentu mallonge komence (dum kelkaj minutoj), sed ofte la ĵurnalistoj volas tuj demandi. Respondu relative koncize. Fine ofte la ĵurnalistoj volas paroli kun unuopaj partoprenantoj de la renkontiĝo; estas bone ĉeesti kaj akompani la ĵurnaliston tra la domo, al infangrupo, al la libroservo, al lingvokurso, al prelego ktp.

## Neceso de persistado

Varbistoj parolas pri 30 necesaj aperoj de varbanonco; el tiuj la celpersono vidas eble nur 7 aŭ 10. Kp. la konsilon de vendistoj kontakti homon sepfoje antaŭ ol rezigni pri vendado.

## Kontroli la rezulton

Legi aperintajn artikolojn pri Esperanto kaj spekti/aŭskulti radio-/televidekontribuojn por lerni, kio laŭ ĵurnalistoj estas grava (kaj sekve enestu en niaj informoj) kaj kion ili misprezentas (do ni devas prezenti pli zorge aŭ eble entute ne). Tekstoj de ĵurnalistoj: fonto por intervju-ekzercaj demandoj.

## Publikigi la gazetaran eĥon

Dum renkontiĝo oni povas afiŝi gazetartikolojn, komune spekti elsendon, eble aŭskultigi radiokontribuon. Poste publikigo pri la rezulto en retejo kaj Esperanto-gazetoj – la Esperanto-parolantoj ŝatas scii, ke la ekstera mondo interesiĝas pri ili; krome tio povas instigi aliajn pri propra aktiveco; fine tio plibonigas la propran renomon. Necesas por tio kolekti la aperintajn kontribuojn.

## Anoncetoj

Eble anoncoj kaj anoncetoj povas bone subteni amaskomunikilajn rilatojn, ĉefe en loka medio por inviti al kursoj. Indas interŝanĝi ideojn kaj spertojn pri tio, ankaŭ rilate al la financado/kotizalteco por kurspartopreno

## Trejnado

- **5-minutaj dupartneraj intervju-ekzercoj** (preparo por interparolado kun ĵurnalisto kaj por radio/televideo) (Ekzemple: Kio estas Esperanto? Kio okazas dum ĉi tiu semajnfino? Kial vi lernis Esperanton? Kiun avantaĝon donas Esperanto?) Du- aŭ trifoje kun preparolado.
- **Altelefoni ĵurnalistojn** por venigi al evento
- **Verki gazetara(j)n komuniko(j)n** pri renkontiĝo aŭ alia temo
- **Plani la amaskomunikilajn rilatojn** por renkontiĝo

## Ŝanĝo de la publika bildo pri Esperanto kaj Esperantujo

Nuna bildo ĉe parto de la publiko	Celbildo
<b>Morta</b> lingvo (Vaclav Klaus, 6/2008; li poste iom korektis)	<b>Vivanta</b> , uzata en internaciaj renkontiĝoj, interreto (Vikipedio, Google, Ĉinio, ...), komputilaj programoj, muziko, literaturo, familioj, ekster Eŭropo...
<b>Stagnanta aŭ malkreskanta</b> afero (popola kredo kaj ĉe Esperantoparolantoj)	<b>Kreskanta</b> rilate al renkontiĝoj, muziko, denaskuloj, interreto, ekstereŭropo, scienco pri Esperanto
Afero de <b>maljunuloj</b> formortantaj (popola kredo)	afero de ĉiuj aĝoj, multaj <b>infanoj kaj junuloj</b>
Afero por <b>trudemaj misiistoj</b> , kiuj ne komprenas la realecon de la mondo (popola kredo)	Afero por homoj, kiuj ŝatas <b>internaciajn kontaktojn</b> kaj ĝuas apliki lingvon, kun kiu ili sentas sin <b>hejme</b> .
<b>Malsukcesa</b> projekto („Kiel mondlingvo Esperanto estas malsukceso.“ Bayerischer Rundfunk, TV, 2008)	<b>Sukcesa kiel praktike uzata lingvo</b> : Kreiĝis internacia lingvo kaj aktiva tutmonda parolantaro de almenaŭ 100.000 homoj. Milobliĝo dum 100 jaroj (angla: centobliĝo dum 350 jaroj). Plu kreskas en multaj kampoj je 2 ĝis 10 % jare. Ne atendeblas fino de la kresko.
<b>Esperanto aŭ la angla</b> (popola kredo)	<b>La angla kaj Esperanto</b> (por specifaj celoj) La angla funkcias bone; kelkrilate Esperanto funkcias eĉ pli bone.
La <b>angla definitive venkis</b> super Esperanto (popola kredo)	<b>La angla preparas la vojon por Esperanto</b> : Esperanto estas eĉ pli rapide lernebla post lernado de la angla. (Cetere: La ĉinaj ekonomio kaj lingvo survojas por superi la uson-anglajn dum la venontaj jardekoj. „Kiu ne volas lerni Esperanton, tiu devos lerni la ĉinan.“ R. Corsetti)
Ne povas havi <b>kulturon</b> aŭ rilaton al kulturo. (Kadraj gvidlinioj pri multlingveco de la EU-Komisiono, 2005)	... sed jes <b>havas kulturon</b> : Literaturo, muziko, teatro, ...
Ne permesas <b>konatiĝi kun la kulturo</b> de unu lando (de la lernata lingvo). (Reprezentanto de la brita edukministerio)	Permesas <b>interŝanĝon de kulturoj el ĉiuj landoj</b> , ne nur unudirekte de la kulturo de la lernata lingvo al la propra.

